
# Tagiĝo 9

*Neregula cirkulero de
Esperanto-Junularo
en ĈRS.
Eldonas Osvětová beseda,
záj. kr. Esperanto, Opava*



# *Odešel velký člověk . . .*

Těžko vylíčit pocity, které zmítaly nitrem všech poctivých občanů naší republiky při zprávě Ústředního výboru Komunistické strany o smrti presidenta Československé republiky a předsedy KSČ — soudruha Klementa Gottwalda.

Byla to neuvěřitelná a těžká rána, protože náš lid se nestačil ještě ani vzpamatovat z tragické zvěsti o smrti vůdce světového tábora míru a demokracie – soudruha Stalina.

Odešel vůdce našeho pracujícího lidu, zakladatel svobodné lidovědemokratické vlasti, nejvěrnější žák Lenina a Stalina, nejdůslednější bojovník za práva čs. dělnické třídy – první president naší demokratické vlasti – soudruh Klement Gottwald.

Pracující naší vlasti stojí mlčky, s výrazem hluboké úcty u hrobu svého presidenta, který i v dobách nejtěžších dovedl ukázat a určit správnou cestu, jenž učil neklesat na duchu ani v dobách nejtěžších a neztrácet se zřetele své veliké úkoly a cíle.

Žel...- smrt vytrhla soudruha K. Gottwalda z jeho budovatelské práce. Jeho dílo a myšlenky však budou žít v našem pracujícím lidu a budou mu pomáhat v plnění všech velikých ideálů, o něž Klement Gottwald celým svým životem a dílem bojoval!

ANTAŬEN JUNULARO!

Proksimiĝas denove la momento, kiam la reprezentantoj de niaj Junularo-grupoj kunvenos okaze de tutŝtata junulara konferenco kaj pridiskutos kaj ĉefe taksos nian laboron en pasinta jaro.

Certe ni ĉiuj havis la plej bonajn planojn, ni havis entuziasmon, sed ne ĉiam la planoj estis realigitaj kaj ofte eĉ nia entuziasmo perdiĝis .... Sed kiaj estis do kaŭzoj?

Eble vi renkontis malhelpojn fare de organizo, en kiun via rondeto estas envicigita, aŭ vi perdis la kunvenejon, aŭ vi ne havis lernolibrojn ...aŭ fine vi perdis la kredon en nia afero kaj timante la mokojn de kelkaj izolulој vi ĉesis labori por la venko de sankta ideo?

La administraciaj baroj estas certe venkeblaj, se vi taŭge traktos kun via estraro kaj kiel atestas multaj ekzemploj niaj rondetoj per sia komplezo helpi al sia estraro multfoje poste akiris eĉ pluan subtenon!!!

La dua kaŭzo estas certe pli grava. Mi konas la junajn korojn, kiuj estas pretaj por bela ideo tuj ekflamiĝi, tuj ĵuri la obstinon kaj fidelon - sed veninte en ĉiutagon vivon la entuziasmo perdiĝas kaj poste alvenas eĉ duboj ...

Sed por ni, kiuj konatiĝis ne nur kun gramatiko de Esperanto, sed ankaŭ kun "interna ideo" de nia lingvo, kun granda ideo de interkompreniĝo inter la homoj eterne militantaj, sur bazo de lingva unueco - por ni estas la vojo klara: Ni konstante irados la vojon, kiun ni elektis kaj ni kredas, ke nenia forto de l' mondo devigos nin fariĝi malfidelaj al nia granda Afero.

Estante Esperantistoj, ni estas en unuaj vicoj de pacbatalantoj por eterna paco de homaro, ni helpas al kresko de kulturo, al tutmonda progreso, ni donas al homaro rimedon kiel solvi ĉiujn urĝegajn problemojn! Certe ekzistas ankoraŭ multaj homoj, kiuj konsideras nian celon neatingebla, sed ni povas male aserti ilin, ke nenia afero estas neatingebla, se aro da homoj decidiĝis malgraŭ ĉiuj malhelpoj neniam laciĝante atingi ĝin. - Kaj tiu "aro" havas jam kelkajn milionojn da homoj. Ke Esperantistoj reprezentas en la mondo sufiĉe grandan forton, pri tio atestas sukceso de Esperanto en UNESKO. La 16 milionoj da homoj reprezentas la nombron, kiu simpatias kun nia programo, kiu ĝis venos la tempo de oficiala aprobo fariĝos anoj de nia movado.

Do ni, amikoj, komencu denovo entuziasme labori, por ke ni akcelu la alvenon de tiu feliĉa tempo. Kaj se iu dormas aŭ nur revas pri efektivigo de nia celo, ni veku lin, ni konvinku lin, ke li fariĝu aktiva batalanto en la vico de ĉiuj progresemaj Esperantistoj kaj helpu al granda kaj glora realigo de nova sento, kiu eniris la mondon, por ke ĝi tiru la homaron ne al glavo sangon soifanta, sed al eterna harmonio baziĝanta je egaleco, libereco kaj kunfratiĝo de la homoj.

Kaj niaj junaj anoj de la granda verda familio – ni, kiuj transprenos la verdan standardon – ni ĵuru, ke ni restos fidelaj al granda idealo de nia kara Esperanto, ke ni energie laboros por baldaŭa ĝia efektivigo!

"La espero, la obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingos la celon en gloro.

<u>Vážení čtenáři!</u>

Znovu se blíží prázdniny, kdy chce naše Junularo uspořádat letní školu esperanta v přírodě – pod stany.
Minulá táborová škola měla 22 účastníků a trvala 14 dní.

Tábořiště je krásné údolí řeky Moravice, poblíž Hradce u Opavy. Kolkolem je obklopeno hlubokými lesy a kopci, v blízkosti protéká řeka, která nedaleko tvoří výborné přírodní koupaliště.

Možnost výletu ve volném čase je velká, neboť kromě krásných krajinných scenérií jsou v okolí dva hrady. I vzhledem ke studiu je to místo ideální, protože nejsme v práci rušeni lidmi, neboť k nejbližším lidským bytostem je procházkovým tempem asi dvě hodiny cesty.

Letošní školu chceme organizovat však poněkud jinak! Bude trvat celý měsíc - dvakrát po 14 dnech.

V prvním běhu bude kurs, ovšem kurs speciální, jaký vyžaduje otevřená příroda bez školních zdí, a to pro pokročilé a mírně pokročilé. Do druhého termínu zveme především funcionáře jednotlivých Junular, aby si zde vyměnili zkušenosti z práce jak propagační tak kulturní. Společného pobytu využijeme především tím, že budeme hovořit především esperantem, abychom se co nejvíce zdokonalili v praktickém používání našeho jazyka.

Promyslete si tuto příležitost strávit 14 dnů prázdnin v samideanském prostředí a krásné přírodě a pošlete nám předběžné přihlášky, abychom mohli zařídit potřebné záležitosti. V přihlášce uveďte, do kterého běhu se přihlašujete. Přihlášky nám pošlete co nejdříve, protože počet účastníku <u>je omezen</u> - nejpozději do poloviny května!!!
/ Uveď rovněž, má-li vaše Junularo resp. jeho členové ve stany nebo stanové dílce, které byste mohli pro naši školu zapůjčit. Uveďte typ a rozměry!!/

Přihlášky a žádosti o informace posílejte na adresu:

Blažena Kuzníková, Opava, Rooseveltova 17.

<u>LA KONGRESOJ ESPERANTISTAJ OKAZONTAJ TIUN JARON:</u>

MORGL - (Aŭstrio) 3.-10.aŭgusto: 9-a Internacia Junular-kongreso.
ZAGREB - (Jugoslavio) 27 julio-3 aŭgusto: 38 Universala kongreso de Esperanto.
SHEFFIELD - (Britujo) 25. julio-1. aŭgusto: Kongreso de SAT.

LJUBLJANA - (Jugoslavio) 1.-8. aŭgusto. Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj.
LOURDES - (Francujo) 12.-16. aŭgusto: Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj.

# Al nia junularo

Ni prezentas al niaj junaj geesperantistoj artikolon, pli bone biografion de samideano Zemek, kiu persone konatiĝis kun unuaj venkoj kaj sukcesoj de nia Esperanta movado.

Ni, ĉiuj junaj esperantistoj estante ofte tre lacigitaj en nia laboro bezonas instigajn vortojn, kiuj denove entuziasmigus nin kaj donus al ni novajn freŝajn fortojn.

Tiun ĉi taskon la koraj vortoj de s-ano Zemek, dediĉitaj al "junularo, kiu estas estonteco de nia Afero," certe tute plenumos:

-------------------------------

Karaj gesamideanoj!

Kvankam mi estas de koncentrejaj suferaĵoj senĉese ankoraŭ malsaneta, mi pripensis do la geamikajn instigojn de vi, por ke mi priskribu unue en mia tuta vivo, iomete la travivaĵojn de miaj poresperantaj vojaĝadoj, kiel izolulo; kompreneble kiel simpla Esperantisto, sen iu ajn aspiro al grandaj honoroj, en la feliĉega konscio, ke mi servas simple kaj modeste al grava kultura ideo, portonte iam benon al la tuta homaro, neniam havante iajn funkciojn, estante nek instruisto-profesoro, nek oratoro aŭ propagandisto, ĉar mi neniam partoprenis aferojn, kiujn ni ne kapablis. Nia bela esperanta lingvo estas ideo serioza kaj gravega afero, sed ne ludilo, kiun la komencanto eble rajta tuŝi.

Do mi hodiaŭ provos nesperte priskribi la tuton, sole laŭ mia propra opinio kaj laŭ kelkaj fragmentoj - notoj, kiujn hazarde konservis kaj kaŝis mia frato kuracisto kaj bonvolu afable pardoni la erarojn kaj la mankojn de nefakulo, de tiel nomata nekonata verda militisto.

En jaro 1912 mi loĝis kiel preta studento, finanta la abiturientan kaj bankan kursojn en minista urbo Most, en kiu mi ankaŭ estas naskita. Foje, fine de julio, mia kolego Wander montris al ni la ĉefeĉ-ŝlosilon.

Mi tuj ekflamiĝis, lerninte tiam la francan kaj italan lingvojn kaj estinte la internacia futbalisto, do ni ankaŭ aĉetis ĝin kaj rapide kuris hejmen, por esplori la novan mirindaĵon kun mia plej bona kamarado, mia paĉjo, kiu estinte marista ĉefserĝento kaj tiutempe deĵoranta fervojkasisto, jam flue parolis 6 lingvojn. Li mem tiutempe sciis pri Esperanto nenion. Sed ni ambaŭ komencante trarigardi la aĉetitan ŝlosilon, komprenis, ke tio estas 1ingvo, kiun ni devas ellerni. Post kelka tempo mi hazarde legis la flugfolion pri ĉi-jara mondkongreso en Krakovo. Mi rapidis hejmen kaj tuj petegis mian karan paĉjon, ke li donu monon ktp. por partopreni tiun ĉi mondkongreson universalan kiel komencanto, kvankam mi lernis nur 3 lecionojn kiel memlernanto. (Mia patro lernis post mia reveno.) Vojaĝonte mi preparis febre mian malgrandan valizon kaj finfine mi forveturis kaj travivis tie mian unuan neforgeseblan kongreson kun miaj teruraj elparolo kaj prononcado, sciante nur kelkajn frazojn. Sed ni ekkonis persone nian karan Majstron! Domaĝe, ke li tiam demetis sian rolon kiel ĉefo de la movado! Granda estis tiu homo!!!

Pri tiuj travivaĵoj kaj impresoj paroli kaj skribi, estus vere porti akvon je la riveron! Tion certe jam priskribadis spertuloj kaj funkciuloj. Krom tio estas preskaŭ neeble priskribi ĉiujn aranĝojn, kiujn mi dum kongreso tiam ĉeestis. Kalejdoskope preterglitas la bildoj antaŭ miaj okuloj,

unu ŝajnis pli bela ol la alia kaj ĉiuj kune formas unu belegan kaj brilegan tutaĵon: la universalan kongreson!

Ankaŭ hodiaŭ estas por mi post 40 jaroj malfacile rakonti al vi ĉion detale, ĉar multon mi jam vere forgesis, krom tio mi perdis mian tutan Esperanto-havaĵon kaj krome dum 3 jaroj nuntempe ankoraŭ malutilas min la perdado de la memoro, pro teruraj faŝistaj travivaĵoj.

Post la reveno al nia unua kongreso, mi ekkomencante deĵori en Numburk tuj lernis, ĉar mi volis fariĝi tutanima samideano laŭ instigo de mia malgranda instruistino Lydja kaj ni vizitis tie la kurson de jam bone konata kursgvidanto Julius Patzelt el Dolní Grunt, kiu ankaŭ persone ekkonis nian karan Majstron - Patzelt vizitis piedirante la kongreson en Dresden 1908, por ekvidi dron Zamenhof, kun kiu li poste korespondis. Poste ni devis multfoje viziti lin kaj montri miajn fotojn kaj precipe ricevitajn leterojn, kaj rakonti al li pri miaj travivaĵoj en rondo de Zamenhof-familio.

Dum la mondmilito mi devis ĉesi, sed tamen mi skribis al familio de Zamenhof. La mondkongreso en Praha, 1921 ne lasis min dormi, precipe kiam mi ricevis post sufiĉe longa tempo leteron de Lydja, kiu anoncis sian ĉeeston kun sia patrino Klara. Mi vizitis kongreson kaj ekkonis helpe de mia fakkolegino S. Dlouhá nian eble plej malnovan kaj spertan instruistinon Julie Šupichová, kaj niajn plej malnovajn pionirojn dron Kamarýt kaj Pitlík.

Venotjare mi partoprenis kongreson en Helsinki, ekkoninte tie mian fakkamaradon Jalokannel kaj kompreneble la lastan instruistinon Aimo Elmi Tamminnen.

Post paŭzo mi denove komencis labori kaj fariĝis vicdelegito kaj delegito de UEA kaj ankaŭ komitatano de ĈAE, estante de tiu tempo Praha klubano kaj restis ĝis hodiaŭ. De tiu tempo mi partoprenis ĉiujn kongresojn kiel izolulo, estante kvazaŭ membro de Familio Zamenhof. Ilin mi vizitis entute kvinfoje, lastfoje en jaro 1937.

Iajn grandajn meritojn pri Esperanto mi neniam havis, mi ĉiam kaj ĉie restis sole modesta homo, eble idealisto, sed certe simpla Esperantisto. Laŭ eldiro de s-ano Merchant kaj profesoro Cart mi estis en jaro 1929 eble la tria plej fidela ĉeestanto de kongresoj post la ĉiam unua s-ano Warden, kiu tiubempe el 21 universalaj kongresoj partoprenis 20, mi nur 10, kaj la dua mia amiko dro Pitlík, kiu jam en jaro 1912-13 travojaĝis kiel unua eŭropano la tutan Eŭropon peresperante - do mi estis laŭdire iomete servanto al nia movado kaj tial s-ano Schoofs dankis al mi. (Ankaŭ nian centron en Ĝenevo mi vizitis ekkoninte tie krom aliaj dron E. Privat kaj Hans Jakob kaj Scherrer.)

En tiu longa tempo mi havis eblecon persone ekkoni eble preskaŭ ĉiujn "internaciajn lunojn" de nia verda movado, de nia Esperantujo. Kreuz, Ŝapiro kaj "onklon" Miĉjo mi persone vizitis.

Tiel mi ekamikiĝis kaj ekkonis persone krom familio Zamenhof, pli bone per ĝi kun Merchant, Collinson, Page, Robertson, Goldsmith, Malmgren, Baird, Blaise, Nixon, ges. Isbrücker, Cseh, Stojan, Schwartz, Flourenc-Roksano, Lapenna, Szilagyi, Niŝimura, Sinha, Tuchsinski, Saxl, ambaŭ Dresen, Seppik, Kola Aiyi, sed precipe kun Veronika Eksta el Talin, nia dufoja gvidantino al Spitzbergen, Hammerfest kaj Ounasvaara, estinte 1929 Miss Esperanto. Mi dancis kun ŝi la unuan dancon al granda surprizo de miaj konatuloj hungaraj, italaj, nederlandaj nome: Baghi, Kalocsay, Szirom, Zimmerman, Rodely, Telling, Vormaas, Koolschyn ambaŭ Migliorini, Boriena, Bisseti, Fakki, Canuto, Escartin ktp. ktp. Multajn aliajn nomojn kaj personojn mi jam forgesis, mi ne notis ilin, tio ne gravas.

La 8an de aŭgusto 1937 la XXIX Jubilea universala kongreso de Esperanto en Varsovio aljuĝis al mi la arĝentan jubilean stelon n. 231,- do mi fariĝis kavaliro, ĉu ne? Pri tio mi notis jene:

En granda salono de kongresejo okazis la festvespero de la veteranoj de Esperanto-movado. Mi mem staris ĉe Lydja kun kelkaj aliaj, kiuj samtempe, pli bone dirite samnokte ricevis ankaŭ la arĝentan stelon kiel Baghi, Cseh, Gustavsson, Hetzel, ambaŭ Isbrucker, Hanz Jakob, Brehel, Jung, Kalocsay, Litauer, Zimmerman, Steiner, Goldsmith, antaŭ ni la "oraj": Bastien, Blaise, Krestanov, Neužil, Nylen, Sttetler, Karsch, Sakowitz, Salokannel, Zamenhof, Lubliner, sed dron Kamarýt, dron Privat kaj fakkolegon Friedrich mi ne vidis. (Kiel mi poste eksciis, estis Friedrich malsana kaj tial ne povis ĉeesti.)

Prezidis Sakowitz, Bujwid kaj Wyszynsky, skribis Litauer.

Post enkondukaj vortoj orkestro ludis nian himnon kaj kanton de "Ligo" de Mozart kaj fame

konata Baghi eldiris profunde kortuŝan paroladon dediĉitan al la rememoro de la unuaj pioniroj de Esperanto, iliaj penoj kaj laboroj. Dum la mallaŭta ludo de funebra marŝo de Chopin la inspirita oratoro alvokis unu post la alia la nomojn de la unuaj kaj plej konataj ne plu vivantaj protagonistoj de Esperanto. En la plena salono ĉiu ekstaris. Neforgesebla por ĉiam!!

Korŝir-malgaje apenaŭ ludis la muziko, plore sonis la karaj, neniam forgesataj nomoj. Eble ĉiuj okuloj estis plenaj de larmoj, multaj febre tremis ... Tion ĉion ni ne povas bone priskribi, ĉar mi estis sola simpla homo kaj ne poeto-verkisto!

Kaj kiam ĉesis la funebra marŝo, tuj Baghi entuziasme deklamis al la vivantaj pioniroj de la unua kvaron-jarcento de Esperanto. Post solena parolado de Baghi sekvis solena disdono de la atestoj kaj steloj al veteranoj. Kortuŝaj estis la scenoj, precipe kiam la blindaj-gesamideanoj-veteranoj estis honorigitaj per ora aŭ arĝenta insignoj. Neniu povis tiam scii, se ni vidos ilin plu, se ni iam vizitos niajn karegajn ...!!

Kaj nun plu!

La 19an de septembro 1938, do ankoraŭ antaŭ la okupo fare de germanoj, mi estis en Rumburk arestita kiel "danĝera homo" de tiel nomita freikorps kaj verŝajne ankaŭ unu el la unuaj viktimoj de terura faŝismo en nia respubliko. Neniu helpis min, de ĉiuj mi estis forlasita, sed pri tio mi ne volas skribi.

La tempo forpasis. Post cindriĝo de Dresden en februaro 1945 mi piede de tie forkuris, spite miajn vundojn kaj estante de 1939 informita pri subtera movado, mi gardis kaj konservis kiel komisaro en Rumburk de post 4.5.1945 ŝtatan havaĵon sume kelkajn miliardojn Kčs por nia respubliko, restante kiel ĉiam malriĉa kaj senprofitema.

Sed la laboron por patrujo oni ne pagas!

Kiam monda tragedio finiĝis, preskaŭ neniu el tiu malkuraĝa falsa aĉaro estis kulpa – eĉ scipovis sin mortigi, ankaŭ multaj el niaj "herooj" ne estis pli bonaj! Mia simpla opinio! Mi ĉiam batalis honeste, certe mi tiel batalos ĝis mia morto!

Kaŭzo de tiuj travivitaj suferaĵoj de 1938 – 1945 kaj preskaŭ seninterrompa laboro liberiga mi de 10.10.1945 ege malsaniĝis kaj de tiu tempo mi ofte "loĝis" en la malsanulejo kaj poste en sanatorio.

Tial mi devis denove komenci (de jaro 1938 – 1945 mi ne unu reciteton parolis aŭ aŭdis) kaj poste laŭ ordono de kuracisto mi devis min treege gardi kaj nun kiel "dujara" komencanto mi dankas vin pro viaj instigoj.

Ĉar mi jam neniam volas skribi pri tiuj aferoj, por ke neniu diru, ke mi volas fanfaroni pri mi mem, estas tio simple ĉio.

Mi altege ŝatis la eldirojn de nia Majstro:

"Por unueco ni pli aŭ malpli frue venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni, por interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

Ne lasu ekzisti la principon:

Kiu pli laŭte krias, tiu estas prava! Rememoru ĉiam:

Espero, obstino pacienco kaj konkordo!

Fino kaj punkto.

Jan Zemek
Rumburk.

# Regiona konferenco

## en Ostrava

Dua komuna kunveno de regionoj Ostrava kaj Olomouc okazis la 15an de marto en Ostrava. Ĉeestis s-anoj el Ostrava, Třinec, Olomouc, Opava k.a.

En nia mezo ni bonvenigis ankaŭ la redaktoron de "La pacdefendanto" s-anon R. Burda, dron Černý kaj prof. Kožený el Kutná Hora, kiu parolis pri marksismo-leninismo kaj Esperanto.

Je la komenco de sia prelego s. Kožený rememoris la morton de prezidento K. Gottwald, kies laboron ni honorigis per duminuta silento.

Post la prelego de s. Kožený parolis k-do Burda, kiu atentigis pri novaj perspektivoj de nia Movado kaj rekomendis la novan sistemon de nia laboro. Li akcentis, ke nia situacio kvanka ne estas brila, tamen ne estas malespera, - ni laboru pere de Esperanto al atingo de monda paco kaj tiel laborante ni estu certigitaj, ke nia movado povos trankvile evolui en nia ŝtato.

"Ni vidas," diris s. Burda, "ni vidas, ke multaj el la Esperanto-kluboj jam ekkomprenis la situacion kaj komencis labori per nova metodo." Jes, estas necese, por ke ĉiuj kluboj en nia respubliko solvu tiun problemon, por ke ni havu klaran vojon antaŭ ni.

La regiona kunveno havis certe tre grandan signifon precipe al nova organizo de niaj rondetoj kaj kluboj.

PER ESPERANTO BATALU POR MONDPACO

<u>Sub la verda standardo</u>

Dediĉite al s-anino A. R.

La vagonaro rapidas tra malhela nokto. Malpeze ĝi spiras kaj de tempo al tempo milon da fajreroj ĝi ĵetas en nigran nokton. En angulo de malplena kupeo sidas virino. Reveme ŝi rigardas brilantajn fajrerojn, kiuj dancas antaŭ fenestro kiel fajraj neĝeroj. Ŝi rigardas eksteren, sed eble nenion ŝi vidas. Antaŭ ŝiaj okuloj aperis solene lumigita salono de Esperanta kongreso. Ankoraŭ nun ŝi sentas konfuzitan tamburadon de sia koro .... Ŝi eniras salonon... Cigaredfumo ŝvebas super la kapoj de gaje babilantaj kongresanoj. Ridetoj, gajaj salutoj, flataĵoj... Subite ŝi haltis; ĉio tuj malaperis, ĉio estingis krom unusola kapo. Krom vizaĝo, kiun ŝi neniam forgesis, kiu aperadis en doloraj horoj, kiam la vivobatoj vipumis senkompate ŝian koron, krom vizaĝo, kiun ŝi sekrete dorlotis kaj ornamis per plej belaj sentoj, kiel sanktan bildeton. Ŝiaj malfermitaj okuloj observis karan vizaĝon .... kun palaj vangoj ŝi staris kaj rigardis: Eble ŝiaj pensoj havis magian povon kaj levis observitan kapon.- Iliaj okuloj renkontiĝis. La blankhara viro scivole rigardis altkreskan, freŝe aspektantan ... belan virinon kun palaj vangoj, brilantaj okuloj kaj duonmalfermitaj ruĝaj lipoj. ..Post momento li trankvile daŭrigis interbabiladon kun sia najbaro... Li ne rekonis... Palaj vangoj forte ruĝiĝis, altkreska virino rekonsciiĝis. La cigaredfumo ŝvebas super la kapoj de gajaj ĉeestantoj.. rido, gaja babilado, ĝoja aplaŭdo, sukcesa amika vespero. Nur ŝi sidis, ridetis, respondis, aplaŭdis, sed nenion perceptis. Ŝi vidis nur unusolan kapon sub verda standardo kaj aŭdis silentan ploron de sia koro. Li ne rekonis min.... La blankhara viro perdas sian trankvilon. Liaj manoj iomete tremas, liaj okuloj

sekrete de tempo al tempo rigardas enpensigitan, iom tristan samideaninon. Io allogas lin al ŝi, io nekonata, io stranga, sed li ne komprenas ... Li perdis humoron kaj antaŭ fino de la programo li forlasis la salonon, akompanata de brilaj, bluaj okuloj ... Strange! Malbone li dormis. Sed ankaŭ altkreska virino ne dormis bone. Longe ŝi staris en blua, silka nokta ĉemizo antaŭ spegulo, silenta, enpensigita. Antaŭ ŝi defilis multaj jaroj, bonaj kaj malbonaj, detruitaj knabinaj sangoj, mallongaj feliĉaj, sed longaj malgajaj tagoj, maloftaj ĝojoj, oftaj ĉagrenoj, sed ĉie, en ĉiu vivotempo aperadis samtempe kara vizaĝo, kiu akompanis ŝin dum tuta ŝia vivo ... Ho, kiel ŝi sopiregis, kiel ŝi rememoris ĝis hodiaŭ! Kaj li ne rekonis ŝin! Certe li jam tute forgesis ... Malgrandaj larmoj, kiel perletoj ruliĝis de sur ankoraŭ freŝaj vangoj ... Jam tute trankvila descendas ŝi al matenmanĝo. El fotelo en hotela halo leviĝis rapide blankhara viro kaj senvorte ili rigardis unu la alian ... ŝia koro tamburas, liaj okuloj demandas: Mallaŭte ŝi prononcas sian naskiĝurbon. Tiu ĉi sensignifa vorteto kiel fulmo lumigis memoron de blankhara viro. Per ambaŭ manoj li premas la ŝiajn kaj kun tristaj okuloj li flustras ...., kial, kial nur ni disiĝis? Ĉio estis forgesita: longaj jaroj, blankaj haroj, zorgoj, ĉagrenoj kaj en hotelhalo staris konfuzita knabino, kiu kun ruĝaj vangoj aŭskultis mildajn vortojn de ŝatata homo. Subite, ĉio estis tiel facila, bela, senzorga. La vivo estis denove inda por vivi ĝin. En gaja babilado ili pasigis la restintajn momentojn .... kaj nun ŝi forveturas. Ŝi revenas kontenta eĉ feliĉa, ĉar ŝi kunportas malgrandan peceton da feliĉo, peceton, kiu al neniu nenion forrabas, sed al ŝi multe donas, lumeton, kiu varmigos kaj karesos ŝian koron. Dum tuta sia vivo ŝi pagis per larmoj, doloroj, sendormaj noktoj – hodiaŭ ŝi ricevis rekompencon. Ŝi akceptis ĝin dankeme, ĉar ĝi estas nur ŝia kaj por ŝi ... La vagonaro rapidas tra malhela nokto. Sur lipoj de la virino aperis delikata rideto kaj ŝi mallaŭte ripetas la vortojn de adiaŭo: "Ĝis la revido" ... "Sub la verda standardo ............"

Valja Flašarová

## L O K A J  I N F O R M O J:

Přerov: Nia rondeto kunvenadas regule ĉiumarde.(Je la 17.30 horo komencas kurso por komencantoj. De la 19 horo ni amuzas nin ĝis 22 horoj.) En januaro ni entreprenis la skikuran ekskurson ĉirkaŭ Přerov. La 1an de febr. nia rondeto preparis por ČSD prelegon "Per Esperanto ĉirkaŭ tuta mondo". Ĝi vere sukcesis.

Květa Jůrková.

Hradec Králové: Nia rondeto nuntempe ne kunvenadas, ĉar mankas la taŭga ejo!

Lanškroun: Ni mendis la ekspozicion "Klasbatalo kaj pacbatalo en tuta mondo" kaj ĝi estis aranĝita en fabriko "Tesla". Kurson por komencantoj vizitadas proksimume 15 gelernantoj. En unua semajno de ĉiu monato ni okazigas la komitatan kunvenon, kie ni taksas la laboron.

Nové Město n. Met.: Al niaj anoj mankas kuraĝo por plua laboro, kiam aperis ia malfacilaĵo.

Pardubice: Dum decembro ni finigis tri kursojn kaj komence de januaro ni komencis kurson por komencantoj, kiun vizitadas 8 anoj, instruas s-ano Štech. Kurson por progresintoj gvidas s-ano Franc, partoprenas 10 anoj. Kursoj okazas ĉiumerkrede de 18a horo ĝis 20a horo. Post kursoj ni ankoraŭ babilas kaj ludas.

Rychnov n. Kněž.: Ni kunvenadas ĉiumerkrede kaj niaj kunvenoj estas kiel kurso por komencantoj.

S-ano Karel Franc

Hradec u Opavy: "Ĉu vi sukcese en via loko
kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentis jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon?

Iras senhalte via laboro
Honeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
neniam malfortiĝante??

Opava: Anoj de nia Junularo amase abonis bultenon "El Popola Ĉinio". Rekompence ni ricevis el Ĉinio belan libron pri vivo en Ĉinio. Kune kun la fotoj el paca kunsido de orientaziaj nacioj ni ĝin montris al Osvětová beseda, KSČ, Výbor obránců míru k.a. kaj ili surprizitaj promesis al mi plenan subtenon.
Por somere ni preparas la someran lernejon sub tendoj kiel lastjare. La komitata kunsido decidis dediĉi pligrandan zorgon al komencantoj kaj altigi la idean nivelon.

V.

oooooooooooooooooooo

Kial ni ne povas legi pri agado de ceteraj Esperanto-grupoj???
Simple tial, ke ilia delegito ne plenumas sian devon!!!
Ni atendas viajn raportojn!!

Red. de Tagiĝo

Kelkaj sciigoj por delegitoj:

Delegito, kiu jam ricevis gazeton "La Juna Vivo", danku por ĝi al sendinto kaj al prezidanto de Tutmonda Espewranto-Junular-Organizo s-ano Temms Kanter, Lomboskr. 2, Seenwarden, Nederlando.

------------------

Mi atentigas, ke via devo estas raporti pri agado de la grupo ĝis la 7a de ĉiu monato al regiona delegito!

------------------

Se via grupo planas iom gravan Esperantan entreprenon, ne forgesu demandi s-anon Svačina en Lanžhot, ĉu la dato taŭgas?
Poste nepre sciigu pri la preparata entrepreno la redaktoron de tagiĝo kaj ĉefdelegiton, por ke ni povu informi ceterajn!

Via ĉefdelegito.

----------------------------------------------------

KORESPONDI DEZIRAS:

S-ro Akio Hurunc /20 jara/ Nakamichidori III-l4, Higasitarumi, Tarumi-ku, KOBE, Japanio
Pri arkitekturo kaj mondpaco kaj interŝ. Esp. gazetojn.
S-ro Junji Sakai /20 jara/ Mitezima-cho Nisi II-20, Higasiyodonga-Wa, OSAKA, Japanio. Pri ĝen. vivmaniero kaj int. gazetojn.
S-ro Saburo Savabe /20 jara/ Esperanto-rondo de Osaka Teknika Kolegio, Omiya-cho, Asahi-chu, OSAKA, Japanio
F-ino Akito Ito /19-20 jara/ Ota-echo VII-2, Sama-ku, KOBE, Jap.

F-ino Tomoko Tanabe /samaĝa/ 6, 971, Mosigoda, Mikaga-cho, Higuasinada-ku, KOBE, Japanio.